".....1916, Nov. 10an, mi organizis Esperantan kurson, kunvenanta en la bibliotekejo. Ni uzas la Kellerman' "Complete Grammar" kaj multe ŝatas ĝin. Mi opinias ke la bibliotekejo estas pli bona loko por Esperanta klubo ol por klaso, pro la nombro da vizitantoj. La nomo Esperanto sur la bulteno atentigas la publikon al la afero, kaj donas al mi kelkajn okazojn por disdoni propagandilojn. Mi estas enketanta la staton de la movado en Oregon, kiel la unuan pašon en mia propaganda klopo. Tial mi kunmetas liston de la Esperantistoj pri kiuj mi scias, la delegitoj laŭ la U. E. A. jarlibro, la abonantoj al Amerika Esperantisto, kiujn oni afable sendis al mi, kaj tiuj kies nomojn mi ricevas de aliaj. Al ĉiu ĉi mi skribis leteron, petanta la plej multon da informo pri iliaj spertoj je la Esperanta movado. De post Mar. 25an mi estas skribinta al 31 personoj, al iuj Esperante, al aliaj Angle. Kvar leteroj revenis, unu markita "Deceased." Jam 7 respondej alvenis. La raportoj montras 5 klasojn ekster Portland, kaj 3 klubojn en la ŝtato. Gis nun mi ne estas trovinta sufice da materialo por elekti ŝtatan kunvenon."

J. Homer Clark, Konsulo,
706 Glisan St., Portland, Oregon.

ESPERANTO KAJ LA MILITO

Kiom da personoj rifuzis antaŭ la milito sin okupi je Esperanto, protestante ke ili neniam havos la okazon uzi la helpan internacian lingvon.

Kiom multaj hodiaŭ estas ankoraŭ tiuj kiuj, ĉar la malfeliĉegaj cirkonstancoj kiujn ni travivas, ilin ne trasfas senpere, malĉesas fermi la okulojn kaj malkonfesi la utilacon de tiu dua komuna lingvo tiom facile lernebla kaj tiom bone permesanta al fremduloj el diversaj naciecoj sin reciproke kompreni sen interpretistoj.

Kaj tamen kiun pli impresigan lecionon ili povus ricevi ol tiu rezultante de la nuna miltito.

Kiom, efektive, da viroj kaj junuloj, kiuj tute kredis ke neniam ili devos foriri for de sia lando, vidis sin alkondukatajn en regionojn tute nekonatajn de ili, kaj sin trovis ĉe hospitaloj, flegatajn de personoj certe tre sindonemaj, sed ne parolantaj la saman lingvon kiel ili, aŭ militkapititojn kun kamaradoj je multaj naciecoj de kiuj ili ne povis sin komprengi, aŭ ankorau militantojn ĉe popoloj kies la lingvo estas tute ne konata de ili. Kiuj servojn Esperanto, se ili estus ĝin lernintaj antaŭ la miltito, estus farinta ĉu ne, al ĉiu el ili.

Ja, diros kelkaj personoj, vi estas prava. Sed por tio estus estinte necese ke tiuj viroj kaj junuloj estu estintaj antaŭe certaj trovi ĉien esperantistojn kun kiuj ili povos interparoladi. Jes, ni tion tre volonte konfesas. Sed niavice ni rebatos ke precize estas estinte tiel, se, antaŭ la miltito, oni estus bonvolinta agi laŭ la konsiloj de tiuj kiuj klopojis por propagandi Esperanton, kaj eĉ ke, koncerne nin, ni ricevis de la komenco de la militajoj la viziton de pli ol unu trapasanta nian urbon.

Kaj se tiu klarigo kaj tiu pruvo de la utileco de Esperanto ne suficius por konvinki tiujn kiuj havis la ŝancon resti hejme, ke ili pripensu pri ĉiuj fremdaj militistoj, kiujn ĉiutage ili renkontas sur la stratoj aŭ kiujn ili ricevas en iliaj magazenoj. Kaj ke ili diru al ni ĉu ne estus agrable al ili se ili povus kompreni tiujn novajn klientojn kaj komprengi sin de ili je tiom da facileco kiel ili interparolas kun ilia franca klientaro.

Bedaŭroj neoportunaj, diros eble kelkaj, kaj kiuj hodiaŭ devas lasi klopodojn pli urgajn antaŭpaŝi. Ni ne povas konsenti pri tia opinio kaj ni ne ĉesos konsili la tujan lernadon de Esperanto, ne nur ĉar ĉiuj povas lerni tiun lingvon en la daŭro de nur iom da tempo, kaj trovi ĝian utilecon antaŭ, ho ve, ke la unua miltito estu finita, sed krome ĉar la helpa internacia lingvo estas difinita por fari ankorau pli grandajn servojn, kiam la paco estos reveninta, kaj ĉar ni ne rajtas atendi la finon de la militajoj por pretigi nin profiti ĝin.

Niaj anglaj amikoj tion bone komprenis, ili, kaj ili iras antaŭen.

Jen tial unu el iliaj plej potencaj

asocioj tiu mem kiu jam proponis la alprenon de la metrika sistemo por la rilatoj kun la Liganoj, la "Court of Common Council" (la Gildo de l' Civito) ĉe Londono, antaŭ kelkaj monatoj, petis de la "Board of Trade" ke ĝi prezentu al la internacia Ekonomia Konferenco deziresprimon voĉdonitan de tiu asocio favore al la alpreno de dua komuna lingvo por la komercaj rilatoj de l' Liganoj post la miltito.

Komprenble la "Court of Common Council" estis sufice prudenta por ne proponi Esperanton kiel nuran rimedon por solvi tiun problemon de dua komuna lingvo, kaj tiu asocio kontraŭe lasas al la konferenco la taskon elekti inter la lingvoj, angla, franca, rusa, esperanta aŭ kiu ajn alia. Sed, ĉar la Konferenco konsistas el la plej eminentaj ĉe ĉiuj liganaj landoj ne estas tro senpripense opinii ke ĝiaj membroj pli volonte elektos la Zamenhofan lingvon ne nur ĉar, pro ĝia neŭtraleco, ĝia elekto naskos ne-niun ofendosenton inter la Liganoj, sed ankorau ĉar tiu lingvo estas tiom simpla kaj tiom logika ke ĉiuj povas ĝin lerni tre rapide kaj sen ia malfacilajo—eĉ se oni havas nur unuagradan klerrecon—kaj precipe ĉar ĝi estas sufice fleksbla kaj sufice tuta por plenumi ĉiujn bezonojn.

Unu el niaj plej fervoraj anglaj samideanoj, S-ro S. R. Marshall el Londono, volis antaŭe montri la profitojn, kiujn ĉiuj, kaj precipe la Komercistaro, povas elcerpi de tiu elekteto. Kaj pro tio li petis de ĉiuj Esperantistoj ke ili organizu ĉie kursojn por ke povu okazi ĉe ĉiuj landoj liganaj aŭ neŭtralaj komerca praktika eksperimento de la helpa internacia lingvo.

La iniciato de la "Court of Common Council" kaj la eksperimento de S-ro S. R. Marshall pruvas la agemecon de Anglujo. Cu la aliaj nacioj postrestos?

Ni atentigas pri tio la enlandanojn de ĉiu el ili, kaj precipe la esperantistojn. Kaj ni petegas de ili ke ili ne plie malfrue eklabori pri tio, kaj ke, kiel ni, ili faru ĉion eblan por kiel eble plej baldaŭ malfermi la okulojn al la nekredemuloj kaj al la indiferentuoj.

L. Demarcy

Prezidanto-fondinto de la Esperantista Grupo, Beauvaise, Francujo.

KRONIKO NORDAMERIKA

Washington, D. C. Nova kurso fondita tie ĉi kreskiĝas preter ĉiuj atendoj. Jam 18 ekzempleroj de la "Esperanto Teacher" estas uzataj inter la anoj, tiel skribas al ni S-ro A. Mayer.

Boston, Mass. La vigla Bostonia Societo nun kondukas ĉiumonatan festenon, ĉe kiu oni bonvenas ne-Esperantistojn. Oni ĝuas refresajojn por kiu malgranda sumo estas pagita de ĉiu ano de la klubo.

St. Petersburg, Fla. Ce granda festivalo tie ĉi, kiun oni nomas "Parado de la Statoj," F-ino E. Esther Owen portis la Esperantan standardon kaj eltiris multe da atento.

New York, N. Y. Ce la monata Barĉo de la Novjorkaj Esperantistoj en la Y. M. C. A., paroladis S-roj J. W. Bishop, Jr., R. W. Powell, Nicholas Ehrlich, Richard Carter, F-ino Cora Butler kaj aliaj. S-ro D. A. Klajn rimarkis ke pli multe da intereso en Esperanto rezultos de la milito inter la Sud-slavaj gentoj.

komerca afero, li sin turnis al aviado, kaj helpis fari la unuajn eksperimentojn, donis grandajn premiojn, kaj eldonis sennombrajn artikolojn pri la nova scienco. Malgraŭ la mokoj de skeptikuloj, la aviado gigantpaše progresadis, kaj, laŭ sia ĉiama agmainero, S-ro. Archdeacon interesigis pri nova afero—"nia afero." Fervorege li sin deciĉis al la propagando de nia kara lingvo, ĉar li tuj komprenis, ke Esperanto estas la necesa konsekvenco de la mirindaj novaj scienco kaj progreso, kaj, vole, nevole, la tago alvenos kiam la alpreno de Esperanto kiel internacia ilo de komunikado estos "nepre neevitebla." Troviĝas, tial, lia nomo inter la altrangaj fervoruloj en Francujo.

La Direktoroj de la Rondaro gastigis S-ron. Archdeacon ĉe Hotelo Ramono, la rendevuo de niaj samideanoj; kaj, okaze de festeneto je lia honoro en la Klubĉambro de la San Francisco Rondo li faris interesan paroladon. Ni citas parton de la parolado, ne pro la belaj, flataj vortoj per kiuj li alparolis la Kaliforniajn samideanojn, sed pro la grava, leginda enhavo, kiu meritas la zorgan atenton de ĉiu Esperantisto en Usono:

"Al la Kaliforniaj Esperantistoj. Karaj samideanoj: Mi estis tute mirigita vidi kiel vigla estas la Esperanta movado en via belega Stato. Laŭ kion mi jus vidis, ĝi ŝajnas esti la plej grava en Usono. Mi kelkafoje aŭdis, ke la homoj ne estas tiel energiaj kaj efikaj en la okcidenta parto de Usono kiel en la orienta. Laŭ kion mi vidis, tio estas tute kalumnio. (Aplaŭdo.)

"Via benita lando havas tiun senegalan feliĉon havi la plej mildan klimaton en la mondo: vi estas same senigitaj de la suferigaj frostoj de la vintro kaj de la senergiigaj varmeoj de la somero, tiel oftaj en Usono. Pro la sama motivo, via agrikulturo havas prospercon tute nekonita en iu ajn alia parto de la Mondo; kaj tiu prospereco, pro multaj motivoj, senĉese pligrandiĝos.

"La Kaliforniaj Esperantistoj, kun kiuj mi jam havis la plezuron konatiĝi, tre bone scias kian admiregon mi sentas por la Usonanoj; vi povas esti certaj ke miaj paroloj tute ne estas mal sincera flato. Mi pensas ke Usono estas la plej energia, la plej progresema, kaj la plej efika nacio en la

VOJAĜANTO EL FRANCUJO
NIN PRIRIGARDAS!

Antaŭ kelkaj monatoj samideanoj en Los Angeles, San Francisco, kaj najbaraj urboj havis la plezuron konatiĝi kun S-ro. Ernest Archdeacon, fama franca scienculo, ekonomikisto, verkisto, Esperantisto el Parizo. Alveninte en Usono antaŭ du jaroj, li travojaĝis nian landon de Nov Yorko al San Francisco por studadi kaj observi niajn industriajn metodojn, kaj ĉiujn rimedojn per kiuj ni atingis "tian mirindan, senegalan efikemecon." En libro verkota de tiu eminentulo, li intencas montri per ciferoj, statistikoj kaj priskriboj, ke la agemeco, progressemeco kaj praktikemeco de la Usonanoj estas imitindaj en Francujo kaj aliaj landoj.

S-ro. Archdeacon diras pri si mem, ke lia tutviva pasio estas kaj estos la "morgaŭaj progresoj."

Jen, en la jaro 1890 li energie sin okupis pri la konstruado de unu el la unuaj aŭtomobiloj en la mondo. Kiam, post kelkaj jaroj, tiu veturilo fariĝis

Mondo, kaj ankaŭ, ke Kalifornio havas ĉiujn atutojn por fariĝi baldaŭ je ĉiu ajn vidpunkto, la unua ŝtato en Usono. Via ŝtato, sola, estas iom pli granda ol la tuta Francujo; plie, ĝi posedas aron da produktajoj neniel havigeblaj en nia lando. Tio estas konsekvenco de ĝia senkompara klimato. Gi entenas tri milionojn da loĝantoj; ĝi povas kaj devas enteni, iam, kvardek milionojn, kiel Francujo, kaj eĉ pli. Kiam ĉiuj viaj grandegaj teritorioj estos valorigitaj, vidu kian miregindan riĉecon vi povos atingi! Kaj samtempe, mi firme esperas ke la Kalifornia Grupo nepre kreskiĝos tiamaiere, ke ĝi potence helpos altrudi Esperanton ĉe la plej rezistemaj Usonanoj.

"Tiu rezistemeco kontraŭ tiel evidenta progreso estas, por mi, kaŭzo de senlima mirego. Kiel povas okazi, ke praktikema nacio kiel la via ne tuj komprenis la sennombrajn profitojn el tireblajn por si el tiu mirinda ilo: Esperanta lingvo. Vi estas, nekon-testeble, la unua industria nacio en la Mondo. Usono entenas amase ĉiujn ajn produktajojn utiligeblajn de la homaro, ĝi havas mirindan efikecon, kaj ĝi, tute prave, ambicias dissutigi siajn produktajojn kaj agemecon, tra la tuta tero. Kial do viaj viglaj industriistoj ne ankoraŭ vidis kiun profitegon ili povos eltiri de grandega dissendado de siaj katalogoj. Ekzistas pli ol mil malsamaj lingvoj en la Mondo; sekve, Esperanto estos valorrega por tiu speciala celo.

"Ripetadante tiun nevenkeblan argumenton, vi fine, sendube konvinkos viajn samlandanojn; vi pruvos al ili kiel erara estas tiu opinio, kiun vi certe centfoje aŭdis, ke la Usonanoj, kun sia grandega samlingva teritorio, tute ne bezonas Esperanton.

"Cu ne estas strangega paradokso ke la homoj estis alprenintaj, de tre longa tempo, tiun komplikitajn sistemojn de surmara interparolado nomitajn "La Internacia Kodo de la Signaloj," kaj ke ili, ĝis nun, rifuzadis adopti tiun miregindan ilon de praktika konversacio, ĉie uzebla, kiu estas Esperanta lingvo.

"Pli kaj pli, kun la internaciaj komercaj rilatoj plimultiĝintaj, kun la progresado de aviado, kiu baldaŭ ebli-gos ĉirkaŭflugi la tutan Mondon dum la daŭro de unu semajno, la bezono sin altrudos pri internacia ilo de komunikado. Esperanto fariĝos nece-

segia por la mondaj internaciaj kongresoj kiuj nepre okazos post tiu ĉi milito; tiuj kongresoj havantaj la celon eviti, estonte, terurajn katastrofojn kiel nuna, kaj solvi la problemon, tute solveblan, de universala paco.

"Usono, mi ripetas, estas jam la Mondo de siaj grandaj industrioj, kaj, tamen, ĝia nuna sukceso povus esti trioblita helpe de Esperanto. Mi aldonos, finante, ke la alpreno de Esperanto devus esti kunigita kun la unuiĝo de la pezaj kaj monsistemoj, kaj kun la adopto de nia franca metra sistemo.

"Mi trinkas je la prospereco kaj la sukceso de niaj sindonemaj kunbatalantoj, la Usonanoj, de la Kalifornia Esperanta grupo, kaj fine, de la mirinda Zamenhofa lingvo."

M. D. Van Sloun,
Sek. Kalif. Rondaro.

GRAVA PROPONO

Al la Esperantista Asocio de Nord Ameriko,—

Estimataj Gesinjoroj:

Ni subskribitaj anoj de la Membrec-Komitato proponas:

1. Anstataŭon en artikolo VIIa, paragrafo 1a, post la vorto ". . . la sumon," \$2.00 anstataŭ 50 c.

2. Aldonon en la sama artikolo kaj paragrafo je la fino, "kaj oficiala organo, Amerika Esperantisto."

La paragrafo legu:

Artikolo VIIa

Par. 1a. Ciu ano de tiu ĉi Asocio aŭtaŭpagu jare, laŭ maniero sube provizita, la sumon \$2.00, kaj estu rajtigita al unu voĉo kaj oficiala organo Amerika Esperantisto.

(Subskribitaj)

Creston C. Coigne, Adolph Mayer, Clayton R. Bowen, May D. Van Sloun, B. K. Simonek (Estro),	} Membrec-Komitato.
---	---------------------

FOR THE BEGINNER

Edited by Herbert M. Scott

Our readers are invited to send us any difficulties encountered in their study of the international language, inquiries being answered promptly and completely in this department of the magazine.

Rilate al la ĉiama disputo pri la korekta elparolado de la vokaloj esperantaj "e" kaj "o" kompreneble oni interesigus pri la sekvanta diskutado, verkita de nia estimata kunlaboranto S-ro. D. M. Lynds, el Berkeley, Kalif.

Oni konsideru la vokalojn skribitaj laŭ la kutima ordo:—

a
e
i
o
u

Oni notas, ke la unua, tria, kaj kvina estas, kiel oni povas diri, daŭremaj sonoj; tio estas, oni povas daŭrigi la elparoladon de ĉi tiuj sen ŝangi la kvaliton de la sonoj.

Sed se oni daŭrigas la elparoladon de la vokaloj "e" aŭ "o," iliaj sonoj emas eniĝi en la sonojn de la sekvantaj vokaloj respektive en la serio.

Kompreneble, se oni povus elparoli tiujn ĉi vokalojn sen tiaj finaj ŝangoj de la kvalito de la sonoj (iam nomitaj "malapero"), oni farus la korektajn elparoladojn. (Certe oni ne devus elparoli la vokalon "e" tute kiel la du leterojoj "ej.")

Sajnas al mi ke tio estas tre lerta kaj konsiderinda metodo por klarigi tiun disputeman temon.

H. S. Lane,
Sek. Berkeley-a Esp. Rondo.

Answers to Correspondents

Q. In Esperanto how many affixes are there, how many independent roots, how many common-stock and how many technical roots?

A. It is difficult to set an exact figure for the number of affixes, inasmuch as there is no hard and fast division between affixes and other roots; almost any affix may form an independent word, or any short root be used as an affix in building derivatives. However, exclusive of prepositions (all commonly used in word building) the roots generally reckoned as affixes proper may be taken as 38 (8 prefixes and 30 suffixes).

The number of "official" independent roots (such as may be used alone, without grammatical terminations) is 145 (15 pronouns, 16 adjectives, 1 article, 12 numerals, 41 adverbs, 34 prepositions, 11 conjunctions, 7 interjections, 8 particles).

Between common-stock and technical words, again, there is no sharp line of distinction. In the literary language there are somewhat less than 4,000 roots in good use. In the standard technical dictionary, Verax's Enciklopedia Vortareto, there are about 8,000 roots.

Q. How often does the Lingva Komitato issue new words or decisions? Where can these be obtained?

A. The Lingva Komitato has no set periods for issuing its supplements to the Universala Vortaro. It confines itself to sanctioning from time to time words which in its judgment have made good in general practice. Thus far it has published three such lists. These lists and all the work of the Komitato may be found in the files of its organ, Oficiala Gazeto. Millidge's Esperanto-English Dictionary has all roots of Universala Vortaro and Unua Aldono distinguished by special marks.

Q. Is there any rule about quotation marks?

A. There is no set rule, nor even well-fixed usage, in regard to quotation marks. In such minor details, we may, as Dr. Zamenhof has said, safely follow the practice of our mother tongue.

Q. In addressing an envelope for abroad, are we to use the Esperanto or the English form of name of city and country?

A. The English or other natural language form is safer for the present.

Q. Give the Esperanto for: fad, fire-escape, lap (part of the body), to pry (with lever), ski.

A. Fad = manio, fire-escape = fajrsavstuparo, lap = genuoj, to pry = dispuši, ski = ŝkio.

Statement of the Ownership, Management, Circulation, Etc., required by the Act of Congress of August 24, 1912.
Of Amerika Esperantisto, published monthly at West Newton, Mass., for April 1, 1917.

State of Massachusetts, County of Middlesex, ss.

Before me, a Notary Public in and for the State and county aforesaid, personally appeared Ernest F. Dow, who, having been duly sworn according to law, deposes and says that he is the Business Manager of the Amerika Esperantisto and that the following is, to the best of his knowledge and belief, a true statement of the ownership, management (and if a daily paper, the circulation), etc., of the aforesaid publication for the date shown in the above caption, required by the Act of August 24, 1912, embodied in section 443, Postal Laws and Regulations, printed on the reverse of this form, to wit:

1. That the names and addresses of the publisher, editor, managing editor, and business managers are:

Publisher, The American Esperantist Co., Inc., West Newton, Mass.
Editor, Isabelle M. Horn, New Orleans, La.
Managing Editor, Ernest F. Dow, West Newton, Mass.

Business Manager, Ernest F. Dow, West Newton, Mass.

2. That the owners are: (Give names and addresses of individual owners, or, if a corporation, give its name and the names and addresses of stockholders owning or holding 1 per cent or more of the total amount of stock.)

The Esperanto Association of North America, Inc.: Officers; Dr. H. W. Yemans, Alcatraz, Calif.; Dr. B. K. Simonek, Chicago, Ill.; Ernest F. Dow, West Newton, Mass.

Ernest F. Dow, West Newton, Mass.

3. That the known bondholders, mortgagees, and other security holders owning or holding 1 per cent or more of total amount of bonds, mortgages, or other securities are: (If there are none, so state.) None.

4. That the two paragraphs next above, giving the names of the owners, stockholders, and security holders, if any, contain not only the list of stockholders and security holders as they appear upon the books of the company but also, in cases where the stockholder or security holder appears upon the books of the company as trustee or in any other fiduciary relation, the name of the person or corporation for whom such trustee is acting, is given; also that the said two paragraphs contain statements embracing affiant's full knowledge and belief as to the circumstances and conditions under which stockholders and security holders who do not appear upon the books of the company as trustees, hold stock and securities in a capacity other than that of a bona fide owner; and this affiant has no reason to believe that any other person, association, or corporation has any interest direct or indirect in the said stock, bonds, or other securities than as so stated by him.

5. That the average number of copies of each issue of this publication sold or distributed, through the mails or otherwise, to paid subscribers during the six months preceding the date shown above is (This information is required from daily publications only.)

Ernest F. Dow,
Business Manager.

Sworn to and subscribed before me this 5th day of April, 1917.

Seal. Frank M. Grant,
Notary Public.
(My commission expires Dec. 10, 1920.)

Of Course You Are Coming!

Philadelphia, May 28, 1917.

To all in any way interested in the International Language:

The Esperanto Society in this city cordially invites you to participate in the

Tenth Annual Congress of the Esperanto Association of North America

(Place and Date)

.....1917.

Margaret A. Maisch, Secretary, Local Committee, Philadelphia.
753 North 40th Street.

Dear Miss Maisch:

Please note my support of the

Tenth Congress of the Esperanto Association of North America

as follows:

I will be present at the Congress, July 26-29, in Philadelphia.
Send me Congress Ticket, for payment enclosed.
Place me on the Guarantors List for a liability limited to
Dollars to cover a possible deficit.

Remarks:

(Signed)

(Address)

DEZIRAS KORESPONDI

One insertion: 10 cents; four insertions: 25 cents. Announcement consists only of name and full address.

Unufoja anonco: 20 sd.; kvarfoje 50 sd. Anonco konsistas nur el nomo kaj plena adreso.

F-ino Maria Martin, 1102 W. Church St., Urbana, Illinois, Usono. Nur kun gefrem-duloj.⁴

S-ro Jakov Vodanović, G.P.O., Auckland, New Zealand, (Il. PK)⁸

S-ro F. Dufau, rue de l' Arsenal, Maison Aprado, Philippeville, "Algerie."⁴

S-ro Lentin, professeur au College de Philippeville, "Algerie."

S-ro M. Maziere, rue du Ravin, Philippeville, "Algerie."

S-ro Ch. Berg, 10 rue Nationale, Philippeville, "Algerie."⁴

F-ino H. Hacoun, employee des. P. T. T., Philippeville, "Algerie."⁴

THE ADVANCE SHEET

A Quarterly, published and edited by Julia Goldzier, 26 E. 45th St., Bayonne, N. J., U. S. A.

Price 50 cts. a year; \$1.00 for 3 years.

In the interest of Religious and Political Advancement, Orthographical Reform and

ESPERANTO SHORT-WRITING

La gazeto enhavas gravan departamenton pri la Esperanta Mallong-Skribo. Nova serio komencigas en la Somera Eldono. Iu povas eklerni Esperanton kaj ankaŭ la Mallong-Skribon per tiu Eldono; kaj iu povas daŭrigi kaj pli bone lerni tiujn ĉi du temojn se oni jam komencis la studadon.

Demandu specimenan ekzempleron.

MONOGRAM-PRESILO

Oportuna, kompakta, distingiĝa, neta, ĉiamdaŭra. Idea!a donaco por ia okazo.. Unu aŭ du Ĉefliteroj—25 cendoj.

Leahy's, Bx. 264, Alexandria, Va.

MIGRANTAJ KARTOJ !!!

6 FOR 10 cts.

25 FOR 25 cts.

E. H. BECKER
332 Third Ave., Dayton, Ky.

SHEET MUSIC

IN
ENGLISH & ESPERANTO
WITH KEY TO ESPERANTO

Evening and Morning
Torn From Each Other
Save the Boys
Peace Between Nations
The Home Place
The Santa Claus Ship
A Cruel War
America's Prayer for Peace
Too Precious To Lose
Lay Down Your Arms, Ye Nations
No Flowers For Me When I'm Gone
Save United States From Rum
United States of Europe
If 'Twas Your Boy or Mine
Two Songs in One Each 15c postpaid

A. E. BEATTY, Cardington, O.

INVESTIGATE SINGLE TAX

"The Single Tax: What It Is." Henry George
"The Single Tax and the Farmer." Shearman
"The Single Tax and the Businessman." Rusby
All three booklets and the paper
with the Single Tax point of view, 10 weeks 25c.


THE PUBLIC, 122 East 37th Street, New York

STRANGA IDILIO

ARLO BATES and HERBERT HARRIS

25c.

On sale by British Esperanto Association, London
and Herbert Harris, Hyde Park Hotel, Chicago.



La Emerson-a Ludigilo-Fortepiano

La aĉetanto de Emerson-a Ludigilo-Fortepiano aĉetas FELIĈECON je la plej alta senco—feliĉecon kiu estos daŭra, suficega kaj fruktodona; kiu elpenetros la tutan hejmon.

La Emerson-a Ludigilo estas kreskanta ĝojo; ĝia beleco daŭras. Gi posedas tiun plej grandan el ĉiuj fortepianaj kvalitoj, TONO, ĝis rimarkinda grado.

La Ludigilaro aldonas al la beleco de tono, mirigindan amplekson de esprimado, mil eblecojn—je ton-nuancoj kaj homa gracieco.

Vendistoj en ĉefaj urboj kaj urbetoj

Petu Katalogon

EMERSON PIANO COMPANY

Boston, Mass.

(Fondita 1849)